

# LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

du 28 au 30 juin  
Visite de Abdurahman  
Junusov, du Daghestan

*Nian vivon  
bestoj ĝojigas  
kiam la naturo  
vekiĝas  
dum bela sezono*



*Juna sciuro gaje saltas de  
branĉo al branĉo dum novaj  
aveloj kreskas*

*Abelsvarmo kroĉiĝas al arbo  
antaŭ ol trovi novan lokon kaj  
rikolti la valoregan nektaron  
de floroj*

*Hirundoj nestas sub  
tegmento por prizorgi  
siajn idojn*

Fotis Geneviève kaj Maurice Gourichon





# MIAJ TRAVIVAĴOJ KUN ESPERANTO

*La sekva rakonto aperis en "Fen-X", la revuo de Esperanto Nederland, en 1999, okaze de la 90a datreveno de la Haarlema Esperanto-grupo. Transdonis al ni S-ino van Huis-Staritsky, amikino, kiu loĝas en Haarlem, urbo ĝemelita kun Angers kaj kiu permesas al ni ĝin publikigi.*

Nelly Sevenhuijsen rakontas:

Ĉu vi memoras ke en la antaŭa numero mi diris: "Sed tio estas alia rakonto". Nun sekvas ĝi...

En la jaro 1911 mia onklo Habermehl, kiu estis delegito de UEA, ricevis leteron el Rusujo de juna Ruso, kiu deziras korespondi. Mia onklo diris: « Tio estas io por vi, Nelly, mi estas tro aĝa! » Mi kontraŭstaris: "Mi ne estas sufiĉe bona esperantistino!"

Ni ricevis duan leteron de la Ruso kaj tiam mi konsentis. Mi sendis bildkarton, kaj baldaŭ ricevis respondon kun la peto sendi portreton, kion mi faris. Mi skribis: "Jen, mia fotografiaĵo. Mi ne estas 17-jara, sed 19-jara, kiel ankaŭ vi estas". Kaj tiel daŭris la korespondado.

En Varsovio ni renkontis unu al alian. Mitĵa venis tre malfrue kaj ne vizitis kun ni D-nor Zamenhof. Certe li tre bedaŭris tion.

Ĉu ni plaĉis unu al la alia? Jes, mi kredas, sed mi havis la tre fiksan ideon, ke mi neniam volus iri al Rusujo.

Baldaŭ mia patro kaj mi devis foriri al Dresden por tie ĉeesti la kongreson de desegno-instruistoj. Post la hejmenreveno ni denove interkorespondadis; li volis ke mi iru al Rusujo kaj mi invitis lin viziti Nederlandon. Sed kio okazis? Eksplodis la unua mondmilito, kiu finis la tutan interrilaton. En unu el la lastaj leteroj Mitĵa rakontis, ke post la fino de la gimnazio li iros al S-ta Peterburgo por tie studi por fariĝi kuracisto. Poste li volis fariĝi specialisto por oreloj, gorĝo kaj nazo.

Multaj jaroj pasis, ĝis mi aŭdis ke nenio efektiviĝis kaj ke li, jam estante en Peterburgo, tuj devis reiri hejmen por militservi.

Mi nenion plu aŭdis. Ofte ni diris unu al la alia: "Certe tiu juna Ruso mortis". Kion ni aŭdis pri Rusujo, tio estis terura. Unue la milito, due en 1917 la revolucio kaj multaj ekzekutoj kaj kiel tria katastrofo: la malsato. Multaj homoj mortis pro tio. Vi povas kompreni kiel ni estis surprizitaj, kiam mia

patro ricevis poŝtkarton de li, se mi bone memoras en la jaro 1920, kiu anoncis ke li vivas, kvankam en malbonaj cirkonstancoj. Bolŝevikoj forprenis de li ĉiujn posedaĵojn: grandan domon, bienon kun farmejo, vinberejojn kun somerdomo, meblojn, arĝentaĵojn, oraĵojn.

Vi komprenas, ke li tion de tempo al tempo skribis en leteroj. Estis severa cenzuro. Ofte la leteroj estis malfermitaj. Nia unua ago estis sendi manĝaĵojn. Tio estis ebla per la Nansens-fondaĵo. Ni sendis monon al Svedujo kaj de tie oni ekspedis ĝin al la ricevonto. Ĉiuj pakoj enorde alvenis. La ĝojo estis granda! La patrino de Mitĵa pluvis, sed la patro estis mortinta pro tifo. Multaj teruraj infektaj malsanoj tiam regis. Ni faris, kion ni povis. En registritaj leteroj, ni ankaŭ sendis dolarojn. Bedaŭrinde, ili ofte estis ŝtelitaj. Pli kaj pli ni rimarkis per kaŝitaj konfeso, ke li ŝatus forlasi Rusujon. Poste ni aŭdis ke lia vivo estas en danĝero. Ni ne multe povis fari, nur sendi monon por la vojaĝo. Ni havis la simplan ideon, ke li nur devas peti pasporton por senriske forlasi la landon. Sed ne estis tiom simple!

Vi povas kompreni ke nia amiko ne povis malkaŝe skribi pri siaj intencoj. La precizan situacion ni aŭdis poste. Li ne povis forlasi Rusujon per ŝipo el la haveno de Novorosisk, kiu situas ĉe la Nigra Maro. Tio estis danĝera, kaj kaŭzus malliberecon, forsendon al Siberio aŭ ion ajn. Li adiaŭis la patrino kaj iris kun siaj havaĵoj al Moskvo. Precipe por la patrino la adiaŭo estis terura, ĉar ŝi komprenis ke la disiĝo estos ĉiama. En Moskvo Mitĵa provis ricevi permeson por kelktempa libertempo-vizito. Kompreneble oni rifuzis, ĉar oni bone sciis ke tiu vizito ne estos "kelktempa". Mitĵa iris al Petrograd. Li vagis ĉirkaŭ la haveno. Iun tagon li renkontis fidindan rusan junulon, kiu havis oficon ĉe la ŝarĝado de ŝipoj. Mitĵa petis helpon por forlasi Rusujon per fremdlanda ŝipo. Fine la amiko trovis germanan ŝipon, kiu iros al Kiel. Feliĉe Mitĵa havis sufiĉe da dolaroj por subaĉeti germanan mariston. Tio sukcesis, ĉar dolaroj ankaŭ en Germanujo estis tre valoraj. Tiu maristo donis paspermesilon de kolego. "Nenion diru, ĉar oni tuj aŭdos, ke vi ne estas germano..!" La maristo kondukis lin tute suben en la granda ŝipo. Dum la nokto li povis resti en la plej malsupra holdo inter kestoj, sakoj k.t.p. Dum la tago li devis sin kaŝi inter la du muroj de la ŝipo,

## TRANCHES DE VIE AVEC L'ESPÉRANTO

*Le récit ci-dessous est paru dans "Fen-X", la revue de Esperanto Nederland, en 1999, à l'occasion du 90ème anniversaire du club d'Espéranto de Haarlem. Il a été transmis par Mme van Huis-Staritsky, une amie qui habite à Haarlem (Pays-Bas), ville jumelée avec Angers et qui nous autorise à le publier.*

Nelly Sevenhuijsen raconte :

Vous rappelez-vous que dans le précédent numéro, je disais : « Mais ceci est une autre histoire ».

Et bien voici la suite... En 1911, mon oncle Habermehl, qui était délégué de UEA, reçut une carte de Russie d'un jeune russe qui désirait correspondre. Mon oncle dit : « C'est quelque chose pour toi, Nelly, je suis trop âgé ! » Je m'y opposais : « Je ne suis pas suffisamment bonne espérantiste ! »

Une deuxième carte arriva de Russie et je consentis alors. J'envoyai une carte postale et bientôt je reçus une réponse avec une demande d'envoyer un petit portrait, ce que je fis. J'écrivis : « Voici ma photo. Je n'ai pas 17 ans mais 19, comme vous ». Et ainsi, la correspondance continua.

A Varsovie, nous nous rencontrâmes. Mitya arriva trop tard et ne pu rendre visite avec nous au Dr Zamenhof. Il l'a beaucoup regretté.

Est-ce que nous nous sommes plu ? Oui, je crois mais j'avais l'idée bien arrêtée que jamais je ne voudrais aller en Russie.

Bientôt mon père et moi, nous dûmes partir pour aller à Dresde afin d'assister au congrès des enseignants de dessin. Au retour à la maison, nous correspondîmes de nouveau ; il voulait que j'aille en Russie et moi, je l'invitais à visiter les Pays-Bas. Alors, qu'arriva-t-il ? La première guerre mondiale explosa et mit complètement fin à nos relations. Dans une de ses dernières lettres, Mitĵa racontait qu'après la fin du lycée, il irait à St-Petersbourg pour y étudier la médecine. Après, il voulait se spécialiser en ORL.

Beaucoup d'années passèrent jusqu'à ce que j'apprenne que rien ne lui était arrivé et qu'étant à St-Petersbourg, il devait tout de suite rentrer chez lui pour le service militaire.

Et puis je n'en ai plus entendu parler. Souvent, on se disait entre nous : « Certainement ce jeune Russe est mort ». Ce que j'entendais sur la Russie était horrible. D'abord la guerre, puis en 1917 la révolution avec beaucoup d'exécutions et comme troisième catastrophe, la famine. Beaucoup de gens en moururent. Vous pouvez comprendre combien j'étais surprise quand mon père reçut une carte postale de lui, si j'ai bonne mémoire en 1920, et qui annonçait qu'il était en vie, quoique dans de mauvaises conditions. Les Bolcheviques lui avaient pris tout ce qu'il possédait : une grande maison, des biens avec une ferme, des vignes avec une maison d'été, des meubles, de l'argenterie, des bijoux.

Vous comprenez qu'il en parlait de temps en temps dans ses lettres. Il régnait une censure sévère. Souvent, les lettres étaient ouvertes. Notre première action fut d'envoyer de la nourriture. Cela était possible avec la fondation Nansen. Nous envoyâmes de l'argent en Suède et de là, des paquets lui étaient envoyés à l'adresse indiquée. Tous les colis arrivèrent correctement. La joie était grande ! La mère de Mitya vivait encore, le père était décédé du typhus. Plusieurs maladies infectieuses sévissaient, c'était terrible. Nous avons fait ce que nous pouvions. Nous avons aussi envoyé des dollars dans des courriers recommandés. Malheureusement ils étaient souvent volés. De plus en plus, nous remarquâmes, par des confessions

kie kuŝas la ankröĉenoj.

"Estu precipe tre singarda, ĝis ni pasis la insulon Kronstad. Tiam la rusaj soldataj kontrolistoj forlasos la ŝipon. Dumnokte mi donos al vi nutraĵon". Dank' al la maristo, kiu lasis fali la lanternon, la soldatoj ne povis trovi la tre timeman Mitja'n. Ĉio sukcesis kaj post ses tagoj la ŝipo atingis Kiel. Tiam la maristo kondukis Mitja'n supren. Li tute ne povis vidi. La aliaj maristoj multe ridis, ĉar Mitja aspektis kiel mizerulo: ne razita, ne lavita, tute ŝmirita per oleo. La maristoj faris sian eblon por helpi lin. Mitja ŝanĝis monon kaj iris al Hamburg. De tie li skribis poŝtkarton al mi. Kiel mi estis mirigita! La sekvantan tagon mi ricevis leteron el Rusujo, la lastan. Tie li skribis: "Petrograd, la 26-an de majo 1923. Hodiaŭ aŭ morgaŭ mi forveturos el Petrograd. Deziru al mi feliĉan kaj prosperan vojon. La risko estas granda, sed mi devas esperi. Por atingi mian celon, mi estas preta oferi mian vivon, do se mi ne venos post unu, du semajnoj, tio signifos ke io malbona okazis al mi. Salutojn korajn al vi ĉiuj. Via Mitja." Feliĉe

mi en tiu momento jam sciis la bonan finon. Eble vi pensas ke nun Mitja povos tuj iri al Nederlando? Ho ne, li ne havis pasporton nek enirpermeson. Feliĉe delegito en Osnabrück helpis lin akiri restadpermeson en Germanujo. Mia unua ago estis sendi multan monon, por ke li povu aĉeti vestojn kaj ankaŭ pagi la delegiton por la gastado en lia hejmo: Germanoj estis tiam tre malriĉaj. Due mi skribis al la Ministerio de eksterlandaj aferoj kaj petis enirpermeson por elmigrinta Ruso. Post kelka tempo venis ŝtaticisto por peti informojn. Ni tre sincere devis atesti, ke la Ruso ne estas komunisto. Tion ni plene povis klarigi. Tiam, post kelkaj semajnoj, mi ricevis la valoran paperon. Kia ĝojo! Mitja preparis sin por la vojaĝo. Ĉe la landlimo li estis esplorita de kuracisto, por scii ĉu li havas infektan malsanon. Ĉio estis en ordo. La 27-an de junio 1923 li alvenis en Amsterdam, kie mi renkontis lin. Unue ni ambaŭ estis konfuzitaj, sed tio baldaŭ pasis. Post unu jaro ni geedziĝis! ■

cachées, qu'il aimerait quitter la Russie. Plus tard, on nous dit que sa vie était en danger. Nous ne pouvions pas faire grand-chose, seulement envoyer de l'argent pour le voyage. Nous pensions naïvement qu'il suffisait qu'il demande un passeport pour quitter le pays sans risque. Mais il n'en était rien!

Vous pouvez comprendre que notre ami ne pouvait ouvertement parler de ses intentions. Plus tard, nous avons compris la situation précise. Il ne pouvait quitter la Russie par bateau depuis le port de Novorossiisk qui se situait sur la Mer Noire. C'était dangereux et provoquerait son arrestation et il serait déporté en Sibérie ou n'importe où. Il fit ses adieux à sa mère et alla avec ses affaires à Moscou. Surtout pour la mère, les adieux furent terribles, car elle comprenait que la séparation serait pour toute la vie. A Moscou, Mitya essaya de recevoir une autorisation de visite de vacances. Bien sûr on lui refusa car on savait bien que cette visite ne serait pas pour «quelque temps». Mitya alla à Pétrograd. Flânant autour du port, il rencontra un jour un jeune russe digne de confiance et qui était employé au chargement des bateaux. Mitya sollicita de l'aide pour quitter la Russie par un bateau d'un pays étranger. Finalement, l'ami trouva un bateau allemand qui allait à Kiel. Heureusement, Mitya avait assez de dollars pour soudoyer un marin allemand. Cela réussit parce qu'en Allemagne, les dollars étaient recherchés. Le marin lui donna l'autorisation d'embarquement d'un collègue. «Ne parle pas car on entendra tout de suite que tu n'es pas allemand!» Le marin le conduisit au fond du grand navire. Pendant la nuit, il pouvait rester dans la plus petite cale, entre les caisses, les sacs etc. Le jour, il devait se cacher entre les deux parois du bateau, où se trouvait la chaîne de l'ancre.

«Surtout, sois sur tes gardes jusqu'à ce que nous passions l'île de Kronstadt. Alors les marins russes de surveillance quitteront le navire. Dans la nuit, je te donnerai de la nourriture». Grâce au marin qui laissa tomber sa lanterne, les soldats ne purent trouver le très craintif Mitya. Tout réussit et après six jours, le navire atteignit Kiel. Alors le marin conduisit Mitya sur le pont. Il ne pouvait rien voir. Les autres marins rirent beaucoup car Mitya avait l'aspect d'un misérable: pas rasé, pas lavé, tout couvert d'huile. Les marins l'aidèrent comme ils purent. Mitya changea son argent et alla à Hambourg. De là, il m'écrivit une carte postale. Comme je fus surprise! Le jour suivant, je reçus une carte de Russie, la dernière. Là, il écrivait: «Petrograd, le 26 mai 1923. Aujourd'hui ou demain, je quitterai Petrograd. Souhaite-moi un chemin heureux vers le succès. Le risque est grand mais je dois garder espoir. Pour atteindre mon but, je suis prêt à offrir ma vie, donc si je n'arrive pas dans une ou deux semaines, cela voudra dire qu'un malheur m'est arrivé. Cordiales salutations à vous tous. Votre Mitya.» Heureusement, à ce moment-là, je connaissais déjà la fin heureuse de l'histoire. Vous pensez peut-être que Mitya a pu ensuite immédiatement se rendre aux Pays-Bas? Oh non, il n'avait ni passeport ni autorisation d'entrée. Heureusement, un délégué à Osnabrück l'aida à obtenir un titre de séjour en Allemagne. Mon premier geste fut d'envoyer beaucoup d'argent pour qu'il puisse acheter des vêtements et payer aussi le délégué pour le séjour dans sa maison: les Allemands étaient alors très pauvres. Puis j'écrivis au Ministère des Affaires Étrangères pour solliciter une autorisation d'entrée pour un immigré russe. Après quelque temps, un fonctionnaire vint pour demander des informations. Nous avons dû très sincèrement attester que le Russe n'était pas communiste. Cela, nous pouvions pleinement l'expliquer. Alors, après quelques semaines, nous reçûmes le précieux papier. Quelle joie! Mitya se prépara pour le voyage. À la frontière, un médecin l'examina au cas où il aurait eu une maladie contagieuse. Tout était en ordre. Le 27 juin 1923, il arriva à Amsterdam où je le rencontrai. D'abord nous étions tous les deux décontenancés, mais cela passa bientôt. Un an après, nous nous sommes mariés! ■

## Recepto de veganaj kuketoj

*Vegana recepto de kuketoj proponita de Pauline, libere kaj gaje adaptita de la Esperantista konversacia anĝeva grupo.*



### INGREDIENCOJ

(aŭ almiksaĵoj)  
 - 2 glasoj da tritika faruno T65 (ĝi enhavas iom da brano)  
 - duonglaso da olivoleo  
 - duonglaso da rapadura sukero aŭ **stevia** sukero (se kolesterolo aŭ diabeto tiklas vin)  
 - duonglaso da varma akvo ĉ.50 gradojn (fakte temperaturo ne vere gravas)

- 4 supkuleroj da papavgrajnoj (sed atentu la postan heroinecan ŝvebadon!)  
 - anizgrajnoj aŭ cinamo aŭ io ajn kiel vanilo aŭ ĉokoladpecetoj, kokosppecetoj ktp. laŭguste.

### PREPARADO

Ne forgesu lavi la manojn...

- miksu kune la diversajn ingrediencojn  
 - tutkore **knedu** mane (ne robote) la paston rezultantan de la miksado  
 - formu buletojn (averaĝe 2 cm diametre pli-malpli 1-milimetro; uzu **šovmezurilon** preferinde elektronikan!)  
 - platigu la buletojn por formi diskojn (5 mm dikajn)  
 - metu en varman malnovan fornon je ĉ. 250° aŭ se vi ne havas malnovan fornon, vi povas uzi novan je 200°)  
 - kuiru dum apriore pli-malpli 20 minutoj sed vi povas ĉesi kiam vi flaras (se vi ne malvarmumis) la bonan odoron.  
 - gUstUmU, uuuh!  
 - akompanu per botelo da **Côteaux du Layon** malvarmeta, ni diru kvingrada.

*PS: ni ja gustumis ilin, dankon Pauline.*



## Tio kio okazis...

### Esperanto-Angers informas la junulojn

#### En mezlernejo Charles de Foucauld

Kvarafoje, informado pri Esperanto okazis la 1-an de marto 2016 en la mezlernejo Charles-de-Foucauld en Beaupréau, kadre de la "Internacia semajno". Eo estis prezentita al du klasoj. La lernantoj (ĉirkaŭ 15-jaraĝaj) entuziasme partoprenis. Ili montris sin sufiĉe brilaj dum la etaj taskoj proponitaj.

#### En liceo Renoir

La 31-an de marto kaj la 1-an de aprilo, Espéranto-Angers prezentis Esperanton al la gelernantoj de la liceo Renoir en Angers dum la "Renoiriennes".

Tiu evento kreita de gelernantoj proponis dum 2 tagoj diskutojn, prezentadojn, filmojn, ktp, pri la temo "respekto kaj humaneco". En du matenaj atelieroj dediĉitaj al Esperanto, pli ol 70 gelernantoj 15-18 jaraĝaj venis malkovri la filmon "Esperanto" de Dominique Gautier. Debato sekvis pri la uzo de la lingvo, la motivoj por ĝin lerni, la kreado de Esperanto, ktp. Poste, la gelernantoj povis komuniki kun pola, ukraina kaj ĉinaj Esperantistoj per Skajpo.

Du interesaj, vivantaj kaj gravaj tagoj por ĉiuj!

#### Au collège Charles de Foucauld

Pour la quatrième fois, une information sur l'Espéranto a eu lieu le mardi 1er mars 2016 au collège Charles-de-Foucauld de Beaupréau, dans le cadre du projet de la "Semaine internationale". Cette intervention s'est faite auprès de 2 classes d'élèves (3ème G et 3ème C) avec une participation très enthousiaste de ces élèves. Ils se sont montrés plutôt brillants aux petits essais proposés.

#### Au lycée Renoir

Les 31 mars et 1er avril 2016, Espéranto-Angers a présenté l'espéranto aux élèves du lycée Renoir à Angers au cours des "Renoiriennes".

Cet événement à l'initiative des élèves proposait pendant deux jours des projections, débats, présentations sur le thème de l'humain et du respect. Au cours de deux matinées consacrées à l'espéranto, plus de 70 élèves de 15 à 18 ans sont venus découvrir le film «Esperanto» de Dominique Gautier, suivi d'un débat. Les questions se sont succédées sur l'intérêt de l'espéranto, la raison de son apprentissage, la syntaxe de la langue, etc... Puis il fut proposé de communiquer en espéranto par Skype avec des espérantistes polonais, ukrainien, chinoises.

Deux jours captivants de découvertes pour les élèves et les espérantistes!



Dum la prezentado de la skeĉo "akcidento"

Sabaton la 5-an de marto 2016, en ĉambro Satellite en la Centro Jean Vilar en Angers, okazis nia ĝenerala jar-kunveno.

Por pli da klareco kaj videbleco, ni decidis ŝanĝi la nomon de nia asocio ; ĝi nun estas :

#### Espéranto-Angers

Post la kutimaj voĉdonoj pri la agad- kaj financ-raportoj, loko estis lasita al distraĵoj : Jeannine Daguin prezentis sian lumbildaron pri la Universala Kongreso dum la pasinta somero en Lille, Francio.

Poste la lernantoj de la konversacia kurso ludis skeĉeton titolitan "la akcidento".

Tiu amika kunveno finiĝis per la tradicia reĝkuko.

Jen la nova estraro :

Président : Jeanik Marolleau

Secrétaire : Pauline Gaborit

Trésorière : Jeannine Daguin

La adres-sidejo situas ekde nun :

#### Espéranto-Angers

3, allée du Haras, 49100 Angers

Tél. 02 41 20 19 40

## Nia ĝenerala kunveno

### Notre assemblée générale

Samedi 5 mars 2016, salle Satellite du centre Jean Vilar à Angers, s'est déroulée notre assemblée générale annuelle.

Pour plus de clarté et de visibilité, il a été décidé de changer le nom de l'association, qui devient :

#### Espéranto-Angers

Après les habituels votes sur les rapports d'activité et rapport financier, place aux distractions :

Jeannine Daguin présenta son diaporama sur le congrès mondial de l'été dernier à Lille.

Puis les élèves du cours de conversation jouèrent un petit sketch intitulé "l'accident".

Cette amicale réunion s'est clôturée par la traditionnelle galette.

Composition du nouveau bureau :

Président : Jeanik Marolleau

Secrétaire : Pauline Gaborit

Trésorière : Jeannine Daguin

Le siège social est dorénavant le suivant :

#### Espéranto-Angers

3, allée du Haras, 49100 Angers

Tél. 02 41 20 19 40

## HUMURO

- Kiu estas la plej bona tempo por rikolti pomojn ? demandas la instruisto.  
 - Estas la momento, kiam la proprietulo de la arboj foriris al la ĉasado kun sia hundo.

- Mi esperas, ŝi diras al la dentisto, ke tiu dentoelŝiro okazos sen doloro.  
 - Ankaŭ mi esperas tion, sed mi ne povas promesi. Lastsemajne, elŝirante unu denton, mi tordis al mi la pojnon, kaj tio tre dolorigis min.



Fonto :  
 "Am...uziĝu", André Cherpillod, Eldono La Blanchetière

Desegnis Frédéric Lauriol

## Tio kio okazis...



Saeed Ahmad

# Vizito de la pakistanano Saeed Ahmad



Saeed, Genevieve kaj Maurice en troglotita restoracio



Saeed antaŭ la mapo de Pakistano

Saeed naskiĝis en la regiono Panĝabio, en la nordoriento de Pakistano. Kvindeknaŭ jaraĝa el familio kiu nombras dek gefilojn, el kiuj kvar filinoj, li estas la plej aĝa el la filoj.

Dum lia infaneco, 17 personoj vivis kune hejme. Lia patro mortis antaŭ 14 jaroj. Saeed estas admirema al la patrino kiu multe laboris, interalie kiel kudristino, kaj havas amon en la koro.

Poste, Saeed vivis en urbo kaj laboris en ekonomio kaj kiel instruisto. Li estas religie islamano. Li verkis pli ol 20 libroj en kvar lingvoj (panĝaba, angla, urdua kaj esperanto). Li jam venis 2-foje en Francio: unue, por la ducenta datreveno de la franca revolucio kaj, due, en 2015 por la universala kongreso en Lillo. Li rondvizitis Francion, kaj alvenis en Angers sabaton la 19-an ĝis mardon la 22-an de marto, antaŭ ol daŭrigi al Tours.

Niaj turismaj vizitoj kun Saeed:

En la regiono "Valo de la Luaro", Genevieve kaj Maurice akompanis lin laŭ la du bordoj de la rivero ĝis la urbo Saumur. La ĉevalrajdantoj, la kastelo kaj la blankaj kalkaj ŝtonoj de domoj, multe plaĉis al Saeed, kaj ĉefe diversaj kavernoj, trogloditivivejoj. En la bela vilaĝeto Rou-Marson, li malkovris la tipan recepton per varmaj farĉitaj panbuloj. Revenante, li

vizitis la troglodit-farmon de Forges. Alia itinero proponita al li ebligis la viziton de la abatejo Notre-Dame de Cunault.

Saeed multe fotis kaj senĉese notis. Cetere, li volas verki libron pri Francio. Laŭ la diro de Saeed "Vera Francio ne estas Parizo"!

Lunde en Angers: Arlette kaj Laurent montris al li la kastelon, kelkajn malnovajn stratojn tra "La Cité", la katedralon, la domon de Adamo.

Lia prelego: Pakistano kaj Panĝaba regiono.

Islamabad estas la ĉefurbo (freŝdata urbo).

Sesa lando la plej homplena el la mondo, Pakistano havas tre altan naskokvanton.

La limo kun Afganlando estas tre longa; ankaŭ la limo kun Hindio estas longega (1200 km).

Pakistano malamikas kun Irano. Male, ĝi bone amikas kun Ĉinio. Ĉinio partoprenas en ĉefkonstruoj; ekz. longega vojo kiu transiras la landon de Himalajo norde ĝis la Araba maro sude.

Origina nomo de Panĝabio estas: "5 riveroj". La ĉefa rivero nomiĝas Sindh. Ĝi alfluas de Himalajo. Panĝabio entenas 120 milionojn da loĝantoj (60% el la tuta pakistana loĝantaro).

La vetero bone taŭgas al produktiva agrikulturo. Ekde majo la temperaturo atingas 40 gradojn, antaŭ la musono, Tial bone kreskas tritiko kaj rizo, konsumataj de najbaraj landoj. Oni trovas ankaŭ imponan produktadon de fruktoj, precipe la mangoj tre parfumitaj. Por Saeed, la mango estas la reĝino de fruktoj. Panĝabio ankaŭ posedas salan minejon 300 kilometrojn longan!

La vilaĝanoj, ĉefe la virinoj, multe laboras, interalie por la melkado de bovinoj aŭ kaprinoj kaj por transformi lakton en buteron aŭ jogurton.

La lasta parto de la prelego estis rezervita al sufismo kiu estas islama movado. La proverbo de Saeed estas: "Metu la nomon de Dio sur la langon"....

## Visite du pakistanais Saeed Ahmad

Saeed est né dans la région du Pendjab, au nord-est du Pakistan. Âgé de 59 ans, il est l'aîné des garçons d'une famille de dix enfants, dont 4 filles.

Durant son enfance, 17 personnes vivaient ensemble au foyer. Son père mourut il y a 14 ans. Saeed est admiratif pour sa mère qui travailla beaucoup, comme couturière, et qui a l'amour dans le cœur. Devenu citoyen, il a travaillé dans le milieu financier et il fut enseignant.

Il est de religion musulmane. Saeed a écrit plus de 20 livres en quatre langues (pendjabi, anglais, ourdou et espéranto). Il est déjà venu 2 fois en France: tout d'abord pour le bicentenaire de la révolution, puis la deuxième fois en 2015, pour le Congrès Mondial à Lille.

Actuellement en tournée en France, il a séjourné à Angers du samedi 19 au mardi 22 mars, avant de poursuivre vers Tours.

Nos visites avec Saeed:

La vallée de la Loire: Genevieve et Maurice l'ont accompagné sur les deux rives du fleuve, jusqu'à Saumur. Les cavaliers, le château, le blanc tuffeau des murs des maisons, et surtout les troglodytes ont beaucoup plu à Saeed. Dans le joli petit village de Rou-Marson, il a découvert les fouaces, recette typique de cette région. Nous avons aussi visité la ferme troglodyte de Forges et l'église abbatiale Notre-Dame de Cunault. Saeed a beaucoup photographié et sans cesse prenait des notes. Il envisage d'écrire un livre sur la France et il aime dire: "La vraie France n'est pas Paris"!

Angers: Arlette et Laurent lui ont montré le château, quelques vieilles rues à travers la cité, la cathédrale, la maison d'Adam.

**La conférence sur le Pakistan et la région du Pendjab:**

Sixième pays le plus peuplé du monde, le Pakistan a une natalité très élevée. Islamabad en est la capitale. Les plus proches voisins sont l'Afghanistan et l'Inde (1200 km de frontière). Il entretient de bonnes relations avec la Chine, qui participe aux grandes constructions du Pakistan; par exemple, la route qui traverse le pays du nord au sud, de l'Himalaya jusqu'à la mer d'Arabie.

L'origine du nom Pendjab est "5 rivières". La rivière principale, appelée Sindh, prend sa source dans l'Himalaya. Le Pendjab compte 120 millions d'habitants (60% de la population totale du Pakistan).

Le climat est propice à une agriculture productive. Cependant la température peut atteindre 40° au mois de mai, avant la mousson. On trouve une impressionnante production de fruits, et principalement les mangues. Pour Saeed, la mangue est la reine des fruits. Le Pendjab possède aussi une importante mine de sel, longue de 300 km! Les villageois, surtout les femmes, travaillent beaucoup, notamment à la traite des vaches ou des chèvres et à la transformation du lait en beurre et yaourt.

Une partie de la conférence fut réservée au soufisme, un des courants de l'islam. La prière tient une place importante dans la vie des villageois. Le proverbe de Saeed est: "Metu la nomon de Dio sur la langon" (Mettez le nom de Dieu sur la langue).



# Selektitaj renkontoj, staĝoj, kongresoj...

## 11-12 junio

Somera staĝo - en Arrout, Ariejo en **FRANCIO**. Semajfina staĝo ĉe Pireneo. Inf: Nicolas Gauffillet, 2 impasse des genets, FR-31450 Ayguesvives, Francio. Rete: novavento@gmail.com

## 14-25 junio

38-a Ĉebalta Esperantista Printempo - en Mielno, **POLLANDO**. Prelegoj kun prezentado de interesaj fotoj, lingvoperfektigado por komencantoj kaj progresantoj, komuna kantado, dancado, ŝeĉoprezentado, libera tribuno de gastoj kaj promenado laŭlonge de la duonoj, ekskursoj. Inf.: Pola Esperanto-Asocio Filio en Gliwice, skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice, Pollando. Tel: +48/660 427 967, rete: stanislaw.mandrak@gmail.com aŭ staman@ka.onet.pl

## 20-24 junio

Promeni tra naturo kaj Vikipedio - en Bouresse, **FRANCIO**. Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj: plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn. Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn kiujn eventuale oni ankaŭ provos plibonigi. Gvidos fakulo Alain Favre. Inf.: Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir FR-86410 Bouresse, Francio. Rete: informoj@kvinpetalo.org

## 25 junio - 2 julio

Seminario de Esperanto - en Chamonix, **FRANCIO** (Alpoj). 3 niveloj de kursoj, marŝado en bela valo de Chamonix. Inf.: AFCE - UAICL, Voldoire Pascale, 4 Allée du Côteau, FR-69530 Brignais, Francio. Rete: pascale.voldoire@gmail.com

## 30 junio - 4 julio

75-a Hispana Kongreso de Esperanto - en Herrera del Duque, **HISPANIO**. Aliĝu al la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto. La programo enhavas altkvalitajn prelegojn (Jorge Camacho, Liven Dek, Miguel Fernandez, Mikaelo Bronŝtejn,...), teatron, koncertojn (Asorti, JoMo, Ĵomart kaj Nataŝa, Acetre), ekskurson al la fama vilaĝo kaj monaĥejo Guadalupe, kaj multajn aliajn agrablajn surprizojn...! Vizitu la retpaĝon [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es). Ni atendas vin. Inf.: Javier Romero, C/Luis Chamizo, 15 Herrera del Duque C.P. ES-06670 Hispanio. Rete: kongreso@esperanto.es

## 2-10 julio

La 52-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET - en Birŝtonas, **LITOVIO**. Baltiaj Esperanto-Tagoj estas internacia Esperanto-renkontiĝo, organizata ekde 1959, laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44291 Kaunas, Litovio. Rete: irenaa@takas.lt

## 16-23 julio

89a SAT-Kongreso - en Herzberg am Harz/Sieber, **GERMANIO**. La 89a kongreso de SAT ofertas riĉan programon por partoprenantoj el la tuta mondo, kulturajn kaj turismajn programojn al vizitantoj, interesiĝantaj kaj pri fakaj temoj kaj pri turismaj vidindaĵoj en la Esperanto-urbo, en la Harz-montaro kaj ĝia regiono en la mezo de Germanio. La evento estas konsiderebla ankaŭ kiel antaŭkongreso antaŭ la 101a UK, kun rekta vetureblo al Slovakio. Inf: Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

## 23-30 julio

45a Internacia Infana-junula Kongreseto - en Nitra, **SLOVAKIO**. Renkonto por infanoj kaj adoleskantoj samtempe kaj samloke kiel la Universala Kongreso. Ĝia programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli Esperanton. Inf.: Veronika Acsádi kaj skipo infana.kongreseto@gmail.com

## 29 julio - 1 aŭgusto

ABELO - Apud-Berlina Esperanta Ludado - en Berlino, **GERMANIO**. Nova semajfina renkontiĝo por ludemuloj apud Berlino. Kune memzorga kun ludado ene kaj ekstere, naĝado, kafoklaĉado, loĝado en simpla naturamika domo. Inf.: Jessica Grasso kaj aliaj, rete: abeloabeloabelo@gmail.com

## 5-14 aŭgusto

SEFT, Somera Esperanto Familia / FERIA Tendaro en Thomsdorf, **GERMANIO**. La lingvo de SEFT estas Esperanto. SEFT ne havas fiksitan programon. Nur okazas tio, kion la partoprenantoj mem aranĝas. Ni helpas unu la alian kaj ferias komune. Inf.: tlustulimu@web.de

## 13-19 aŭgusto

Malkovru, lernu, plibonigu la universalan lingvon Esperanto dum la Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek, **FRANCIO**. Ene de prezervita marbordo, kun rektaj kontaktoj de la loĝantoj, vi malkovros nepenigan lingvon parolatan en pli ol 120 landoj. Bretonio estas fiera pri sia kelta heredaĵo. Venu malkovri ĝin pere de Esperanto kaj riĉa programo. Inf: Association Plouezec Esperanto 5 hent toul broch 22470 Plouezec, Francio. Tel. 02 96 35 73 06 Rete : marbordo@gmail.com

## 20-27 aŭgusto

83-a Itala Kongreso de Esperanto - Frascati, **ITALIO**. Abundos prelegoj, muzikaj prezentoj kaj ekskursoj al centr-italaj turismaĵoj. Komprenoble Romo el nia vidpunkto povas esti konsiderata periferio de Frascati, kaj tie nin akceptos la papo en ĝenerala aŭdienco. Ni kaj 250 aliaj kongresanoj

el la tuta mondo atendas vin. Inf: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38 IT-20143 Milano, Italio. Rete. kongreso@esperanto.it aŭ iej@esperanto.it

## 9-11 septembro

Moskva Esperanto-Renkontiĝo, MER-6 en Moskva regiono, **RUSIO**. MER estas interplektiĝo de la iama SEJT-etoso kaj la nova vento de Esperanto-movado. Seriozaj prelegoj kaj prezentadoj alternas kun kantado, ŝercado kaj babilado. Ni ĉiuj havas kion diri aŭ kanti unu al la alia. Dum MER ne eblas enui, ĉar por tio absolute mankas la tempo! - Kiel aldona agrablaĵo kadre de la aranĝo okazos esperantologia konferenco kun Esperanto kiel laborlingvo, oficiala konferenco de Rusia Universitato de Amikeco de Popoloj (RUDN). Inf.: Dima Ševĉenko, retumanto@gmail.com

## Maison Culturelle de l'Espéranto

### Château de Grésillon

#### SOMERA PROGRAMO 2016

#### 12-17 junio

La Luaro laŭ fluo de la vortoj, gloraj verkistoj kaj la kasteloj de la Luaro, turisma semajno.

#### 4-15 julio

Dektaga Esperanto-kurso pri la esprimo de la tempo, komparstudo de la tempo-problemo inter Esperanto kaj la franca.

#### 6-13 aŭgusto

SOMERAS, Esperanto-studad-semajno. 5 Esperanto-kursoj (niveloj A1-C1) kun prelegoj, koncertoj kaj aliaj aktivaj, opcie tuttaga ekskurso.

#### 21-28 aŭgusto

6-a Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj. Ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko kaj Esperanto-kursoj.

#### alklaku ĉi-tie por pli da detaloj

adreso : MCE, Grésillon,  
St.-Martin-d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou  
telefono : 02.41.89.10.34  
retpoŝto : [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

## Nous contacter

### Espéranto-Angers

3 allée du Haras 49100 Angers  
Tél. 02 41 20 19 40 - Courriel : [info@esperanto-angers.fr](mailto:info@esperanto-angers.fr)

## Vous informer

### [www.esperanto-angers.fr](http://www.esperanto-angers.fr)

[www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org), [www.esperanto-jeunes.org](http://www.esperanto-jeunes.org)  
[www.uea.org](http://www.uea.org), [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)